Petletero al Unesko-Komisiono/Oficejo de X-Lando

Esperanto estas internacia lingvo kreita de d-ro L. L. Zamenhof, kaj publikigita en la 26a de julio 1887. Ĝi kiel internacia lingvo multe kontribuis al la monda kulturo kaj al la interkomunikiĝo de la popoloj. Ĝi estas deklarita kiel nacia nemateria kultura heredaĵo de Pollando kaj Kroatio. La naskiĝdato de Esperanto, t.e. la 26a de julio, estas jam agnoskita de la Esperanta komunumo kiel la Tago de Esperanto.

Konsiderante, ke

1. La valoraj faktoj menciitaj en la suba aneksaĵo, el kiuj punktoj 1-7 estas konfirme pravigitaj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) fondita en 1908, la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto, kun membroj en 130 landoj; kaj de aliaj naŭ internaciaj organizoj; konfirmita de la Esperanto-Asocio (nomo de landa asocio) en nia lando;

2. La faktoj menciitaj en la aneksaĵo (punktoj 8-9);

3. La Esperanto-movado en nia lando (malpli ol 300 vortoj?);

4. Nia Esperanto-Asocio (vera nomo de via organizo) estas registrita en la jaro ???. ktp;

5. Nia lando kiel oficiala Membra Ŝtato, rajtas kontribui al Unesko per prezentado de proponoj kaj rajtas esprimi sin pri tutmondaj aferoj;

6. Nia lando, kaptante la ŝancon, devas vidigi al la tuta mondo la valoron de nia nacio. Se ni iniciatos la proponon, Unesko devos noti nian kontribuon en sia dokumento, jen la ekzemplo de "la dokumento pri la Tago de la Portugala lingvo" elŝutebla ĉe Unesko-retejo ĉe https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000370586

Ni do petas vin subskribe iniciati la proponon, ke la 41a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko deklaru la 26an de julio kiel la “Internacian Tagon de Esperanto”.

Por faciligi vian laboron, ni sendas al vi aneksaĵon – proponan malneton. Ĉirkaŭ 15 landoj subskribe sendos la saman/similan dokumenton al Unekso. Ili estas Benino, Bulgario, Burundo, DR Kongo, Germanio, Irano, Hispanio, Kroatio, Latvio, Nepalo, Pollando, Slovakio, Sudo-Afiko, Taĝikio kaj Vjetnamio.

Sincere salutas

Subskribo:

Esperanto-Asocio (aŭ alia organizo) de X-Lando

(Ni sugestas, ke ĉiuj Esperanto-organizoj en via lando subskribu)

2021-6-21

(Bonvolu traduki ĝin al via nacia lingvo, ni sendos al vi la versiojn de UN-lingvoj)

Letero por peti Uneskon deklari 26an de julion kiel Internacian Tagon de Esperanto

Estimataj estraranoj de la Plenuma Estraro de Unesko,

Ni petas, ke vi rekomendu, ke la 41a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko deklaru la 26an de julio kiel la "Internacian Tagon de Esperanto", baze de subaj faktoj, el kiuj punktoj 2-7 estas konfirme pravigitaj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) fondita en 1908, la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto, kun membroj en 130 landoj, inkluzive de la Esperanto-Asocio en nia lando, kaj konfirmitaj de Internacia Ligo de Eseprantistaj Instruistoj (ILEI), Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), Esperanto-Civito, Akademio de Esperanto, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Esperanto-Sekcio de Internacia PEN-Centro, Esperantic Studies Foundation (ESF), Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), kaj konfirmita de la Esperanto-organizaĵo en nia lando.

1. La 26an de julio 1887 d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof publikigis en Pollando (tiama parto de la Rusia Imperio) la projekton de la lingvo "Esperanto". Dum 134 jaroj ĝi fariĝis la plej disvastiĝinta internacia planlingvo. Laŭ datumo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), parolantoj de Esperanto – individuoj, fakaj kaj landaj organizaĵoj troviĝas en ĉirkaŭ 150 landoj. Laŭ certaj esploroj, oni povas kalkuli ĝis ĉirkaŭ 2 milionojn da parolantoj de la lingvo, el kiuj pli ol 2 000 estas denaskaj parolantoj. Ekzistas delonga tradicio ĉiujare solene kaj diversmaniere festi la tagon;

2. Esperanto estas uzata de Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj kadre de UN. Unesko eldonas la version de *Unesko-Kuriero* ekde 2017 kunlabore kun UEA, kaj e kde 2020 kun Ĉinujo; en 2020 ĝi eldonis, kun UEA, la Unesko-libron *De ideoj al ag oj: 70 jaroj de Unesko*; en aprilo 2021 ĝi publikigis la Esperanto-enketon pri Futura Edukado (Klerigado), en kiu la demandaron respondis esperantistoj el ĉirkaŭ 100 l andoj. Plejparto de ili estis el lingvaj minoritatoj, kiuj unuafoje havis ŝancon espri mi sin rekte al Unesko per kaj por Esperanto. En majo 2020, la Konsulta Teamo de Inter-Agenteja Komitato pri Mensa Sano kaj Psikologia Subteno – Konsila Grupo e n Kriza Situacio (IASC MHPSS RG) en la retejo de IASC publikigis la Esperantan ver sion de *Vi estas mia heroo: kiel infanoj povas batali kontraŭ KOVIM-19!*. En 2021, la Monda Organizaĵo pri Sano lanĉis Esperantan kurson pri KOVIM-19 sur sia retejo. T io ege faciligis lingvajn minoritatanojn partopreni en tutmondaj aferoj. Kelkaj mo ndaj organizaĵoj komencas enkonduki Esperanton;

3. Esperanto estas oficiala labora lingvo de 64 internaciaj fakaj asocioj kun membroj el pli ol 130 landoj, temas pri 64 fakoj: Agrikulturo, Ateismo, Bahaismo, Biciklado, Blinduloj, Budhismo, Ekologio, Ekonomio, Komerco, Etnismo, Eŭropa agado, Evangeliismo, Fervojistoj, Filatelo, Framasonoj, Freinet-pedagogio, Futbalo, Goo, Handikapitoj, Hilelismo, Instruado, Interreto, Islamo, Juro, Ĵurnalismo, Kat-amantoj, Katolikismo, Komunismo, Komunumoj, Konstruistoj, Laboristoj, Martinus-kosmologio, Medicinistoj, Mensa Mondcivitanismo, Mormonoj, Motorciklado, Muziko, Naturismo, Naturkuracado, Nefumismo, Numismatiko, Oomoto, Progresema agado, Radio, Religi-komparado, Rotario, Samseksamo, Saniĝo per spiritaj fortoj, Scienco, Sindikatoj, Skoltoj, Solidarecaj rilatoj, Solidareco, Spiritismo, Sporto, Sumoo, Tajĝiĉuano [太 極 拳 tàijíquán [tʰaitɕitɕʰyɛn]], Tea kulturo, Turismo, Unu mondo, Ŭonbulismo, Vegetarismo, Veteranoj, Vivstilo ktp;

3. La Ĝenerala Konferenco de Unesko subtenis Esperanton per du Rezolucioj – IV.1.4. 422 en Montevideo en 1954 kaj 23C/11.11 en Sofio en 1985. La Ĝeneralaj Direktoro j multfoje gratulis Universalajn Kongresojn de Esperanto, inkluzive de Audrey Azo ulay en 2018. En 1959 Unesko proklamis la kreinton de Esperanto, d-ron Ludoviko Lazaro Zamenhof “Granda personeco de la homaro”. Dum la 38a sesio de sia Ĝe nerala Konferenco en 2015, Unesko decidis, ke inter aliaj la centa datreveno de la f orpaso de Ludoviko Zamenhof estu sub la patroneco de Unesko. En decembro 20 17 oni memorsolenis lian 100an morto-datrevenon en Unesko-salono;

4. Esperanto multe kontribuis al edukado/klerigado. Ĝi eniris en lernejojn de elementaj ĝis superaj, de Ameriko ĝis Afriko, de Eŭropo ĝis Azio. Kelkaj landoj disdonas bakalaŭrajn, magistrajn kaj doktorajn diplomojn al studentoj esplorantaj Esperanton. Ĉirkaŭ 3 000 personoj el 76 landoj ricevis diplomojn de KER-ekzamenoj de Esperanto [KER - Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj: Lernado, Instruado, Pritaksado]. Afrikaj infanoj estas klerigataj per Esperantaj libroj donacitaj de la tuta mondo;

5. Esperanto multe kontribuis al kulturoj. Danke al la strebadoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) por Unesko, jam de jardekoj aperis/as Esperantaj tradukoj de 62 majstroverkoj de la monda literaturo en la Serio Oriento kaj Okcidento (kontribuante al la Programo de Unesko por Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj). Eldoniĝis diverslingvaj vortaroj, lernolibroj, multaj libroj kaj periodaĵoj pri kulturoj kaj sciencoj. En Libroservo kaj Biblioteko de UEA, Esperanto-Muzeo en Vieno, Esperanto-Muzeo Zhaozhuang Ĉinio, aparte troviĝas ĉirkaŭ 40 000 Esperantaj libroj. Nekalkuleblaj Esperanto-libroj kaj periodaĵoj troviĝas en la tuta mondo. Multaj landoj produktis poŝtmarkojn, kartojn, artaĵojn aŭ aliajn varojn kun priskriboj en Esperanto, eĉ kun Esperanta varmarko. Per “Esperanto” oni nomas arbarojn, ĝardenojn, parkojn, busojn, metroojn, trajnojn, hotelojn, stratojn eĉ urbon en kelkaj landoj.

6. Per la lokiga, facila, justa, egaleciga kaj neŭtrala lingvo oni, precipe tiuj, kiuj ne scipovas iujn el al oficialaj lingvoj de UN, kaj anoj de “minoritataj lingvoj” facile realigas siajn internaciajn rektajn kontaktojn kaj komunikiĝon, investinte relative malmultajn tempon kaj energion, havante eblon senpere interparoli, prelegi aŭ komunikiĝi sen uzii nterpretistojn en tutmondaj Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK) ĉiujare okazantaj en malsamaj landoj tra la mondo – jam 106 fojojn, kun ĉiufoje de kelkcent ĝis 5 000 partoprenantoj el inter 80 ĝis pli ol 100 landoj. La parolantoj de Esperanto povas facile aperigi siajn verkojn en aliaj kontinentoj;

7. La lingvo Esperanto havas originalan gramatikan strukturon kun elementoj retrovebla j en ĉiuj grandaj lingvofamilioj tra la mondo, kiel jam konstatis pluraj lingvistoj, inter ili Umberto Eco. La leksiko principe akceptas ĉiujn internaciajn vortojn kaj daŭre estas aktualigata kaj kontrolata de la Akademio de Esperanto. Jam de longa tempo eksistas vortaroj en ĉiuj ĉefaj lingvoj de la mondo, kiuj nun troveblas facile ankaŭ en la Interreto;

8. Plurlingveco, kerna valoro de Unuiĝintaj Nacioj, estas esenca faktoro por harmoni a komunikado inter popoloj, kiu antaŭenigas unuecon en diverseco kaj internacia n komprenon, toleremon kaj dialogon. La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Naci oj, per sia rezolucio 71/328 pri plurlingveco, de la 11a de septembro 2017, bonveni gis la efektivigon de tago dediĉita al ĉiu el ĝiaj oficialaj lingvoj por informi kaj kon sciigi pri ĝiaj historio, kulturo kaj uzo kaj instigis la ĝeneralan sekretarion kaj instit uciojn kiel Unesko pripensi etendi ĉi tiun gravan iniciaton al aliaj neoficialaj lingvo j parolataj tra la mondo;

9. La deklaro de la Internacia Tago de Esperanto ne havos financan ŝarĝon por Unes ko. La agadojn rilatajn al la proklamo de la Internacia Tago de Esperanto ĉe Unesk o plenumos UEA mem;

10. Unesko aktive rolas en kaj grave kontribuas al la antaŭenigo de multkulturaj valor oj en edukado/klerigado, kaj ankaŭ de la lingvo Esperanto mem;

11. Pro tio la deklaro de la Internacia Tago de Esperanto estus logika konkludo de ĉi tiu plurjardeka kunagado.

Sincere salutas

Subskribo de:

Unesko-Komisiono/Oficejo de X-Lando

Kontaktaj informoj: